# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**



**PLENUMITA 08/09/2022 Kvincentnaŭdeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 688,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **158,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **138,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **93,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

**MIKROPAŬZOJ REDONAS ENERGION**

5-a de septembro 2022

# DEKLARO DE LA 107-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN MONTREALO, KANADO

La 859 partoprenantoj - el 57 landoj - de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenintaj en Montrealo, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022, traktis la kadran temon "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj." Per teritoria agnosko en la malferma ceremonio de la Kongreso, ni esprimis nian profundan dankon al la diversaj indiĝenaj nacioj, unuavice la ganjenka popolo (Kanien'kehá:ka, Mohawk), kiuj neniam cedis siajn rajtojn je tiu teritorio, kie ni kunvenis.

Per prelegoj, filmoj, diskutrondoj, kaj ankaŭ lingvokurso pri la aniŝinabeka, ni lernis pri la granda diverseco de indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj en Nord-Ameriko kaj tutmonde. Ni konstatis, ke indiĝenaj popoloj ludas gravan rolon en la konservado de naturaj resursoj kaj biologia diverseco, kaj estas portantoj de fundamentaj scioj por nia daŭripova ekzisto sur la Tero. Ni krome aŭdis kiel, malgraŭ multaj baroj kaj atakoj al iliaj rajtoj, tiuj popoloj organiziĝas por daŭre plenumi siajn tradiciajn okupojn, konservi siajn kulturajn praktikojn kaj aserti siajn rajtojn je siaj teroj.

Honore al la komenco de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), nia Kongreso eldonis novan tradukon en Esperanto de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Inter la multaj rajtoj agnoskitaj en tiu dokumento, ni aparte atentigas pri Artikolo 13, laŭ kiu "Indiĝenaj popoloj rajtas revivigi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al estontaj generacioj siajn historiojn, lingvojn, buŝajn tradiciojn, filozofiojn, skribsistemojn kaj literaturojn, kaj asigni kaj reteni siajn proprajn nomojn por komunumoj, lokoj kaj personoj." Kiel movado por lingvaj rajtoj, ni esprimas nian fortan subtenon al tiuj principoj.

La parolantoj de Esperanto alte taksas la valoron de kultura kaj lingva diverseco kaj kunlaboras por realigi lingvan demokration en monda skalo. Konforme al tiuj celoj kaj al la informoj kaj ideoj pritraktitaj en ĉi tiu Kongreso, ni deklaras nian solidarecon kaj subtenon al indiĝenaj popoloj en ties streboj por memdetermino, paco, justeco, kaj interkompreniĝo.

## Jardeko de Indiĝenaj Popoloj kaj aŭstraliaj esperantistoj

Okaze de la komenco de la Jardeko de Indiĝenaj Popoloj deklarita de UN, la Universala Kongreso de Esperanto aprobis ĉi tiun deklaron. Se eĉ UEA komencas interesiĝi pri indiĝenoj, aŭstraliaj esperantistoj devus kapti la okazon por ekstarigi ligojn kun la aŭstraliaj praloĝantoj. Jen simple la unua tasko: traduki la deklaron al kiom eble pli da praloĝantaj lingvoj kaj konigi ĝin al la parolantoj de tiuj lingvoj. Kelkaj tradukoj jem ekzistas, sed ĉefe en "grandaj" lingvoj, elŝuteblaj el https://uea.org/vikio/Deklaro_en_naciaj_lingvoj. Se vi volas kunlabori pli sisteme, bonvolu aliĝi al la listo esperanto-por-indighenaj-popoloj@groups.io.

*Renato Corsetti*






Dum la ferioj ni rendevuas kun infanoj por instrui Esperanton du tagojn po semajne. Tial jen mi sendas fotojn faritajn post la hodiaŭa E-kurso. Tiel ni profitas rememorigi vin ke post unu semajno komenciĝos la nova studjaro 2022-2023.

Bedaŭrinde ĝis nun ni ankoraŭ ne akiris la lernomaterialojn por ili. Ni ektimas ĉu ili vere komencos la studojn? Ni esperas danke al viaj helpemaj koroj ricevi viajn helpojn por rapide solvi la situacion .

Nome de la georfoj *Augustin kaj Betti* (Krome sentis al ni *Erhard Ness*)

## Kial vi, Augustin, instruas Esperanton? Kion ĝi provizas al viaj studentoj?

Respondo: Ĝenerale, ni volas doni al ili "kulturan kapitalon", kiu, ni esperas, helpos ilin en ilia vivo. Unu celo de nia Esperanto-instruado estas doni al ili bazon por pli sukcesa lernado de aliaj lingvoj, kiujn ili bezonos. Kiel mi menciis, la svahila estas ilia gepatra lingvo kaj ili parolas ĝin en la ĉiutaga vivo; ilia sola kontakto kun la franca kaj la angla estas en la lernejo. Estas sciate, ke lingvolernado estas pli facila kiam oni jam spertis fremdan lingvon. Esperanto havas logikan kaj facile kompreneblan strukturon, kaj multaj el ĝiaj radikoj estas kunhavataj kun la franca kaj la angla, do lerni ĝin helpas prepari niajn studentojn por sukcesa akiro de ĉi tiuj lingvoj.

PARTO DE INTERVUJO EL ESPERANTO EN GERMANIO

*Augustin KAKOZWA* <augukako@gmail.com>

# Interesaj faktoj por Propagando

| *.Lernado de fremda lingvo postulas* | **Komparu Esperanton** |
|---|---|
| *Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...* | ..Fonetike senescepta |
| *Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj..............* | ..17senesceptaj reguloj |
| *Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo..........................................* | ..Kunmetitaj vortoj |
| *Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..* | ..Unu prononco |
| *Lernu la lokan parolatan lingvon.........................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la idiomojn de la lingvo ..........................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............* | ..Unu monda lingvo |

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estas plenkreskaj
Do ili estas tre toleremaj kaj helpemaj al lerantoj. *Roger Springer*

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

Karaj Amikoj NOTU! Numero 600 de AE venonta semajno kaj eble 601 precize 11 jarojn post unua de 2011, eble unu semajnon pli poste! Kion povus eksteraŭstraliaj gelegantoj, kiel mi, kontribui? s-ro Ueli HAENNI Ankaŭ Aŭstraliaj Esperantistaj kontributoj bonvenantaj



"La Melburno-Esperanto-klubo bonvenigis novajn kaj malnovajn membrojn pasintan lundon. Ni planas "*wellnesss Day*" Dimanĉon la 9an de Oktobro en Torquay. Ĉiuj estas bonvenaj." *Heather Heldzingen*

